

1 - 3/1983.

/ Tria jaro. /

Adreso : MBSZÖV,
Békéscsaba, Pf : 10,
H - 5 6 0 1-----
Kiel manuskripto - Kézirat gyanánt.
-----A SZÖVETKEZETEK ÉS A NEMZET-
KÖZI NYELV.LA KOOPERATIVOJ KAJ LA INTER-
NACIA LINGVO.

Az 1983-as évet a kommunikáció nemzetközi évének nyilvánították az ENSZ, ezzel is folytatva az előző évek gyakorlatát, egy-egy évet szentelve fontos társadalmi témáknak, melyek az emberiség nagyszámú rétegeinek helyzetével, sorsával és törekvéseivel foglalkoznak, mint legutóbb a gyermekek, az öregek, vagy a rokkantak éve.

A kommunikáció nemzetközi évének egyik - talán leglényegesebb - kérdése a közös nyelv, mely nélkül továbbra sem érti egymást az emberiség, jellehet fejlődő életünk minden területe mielőbb közös nyelvűséget kíván.

Különösen vonatkozik ez a világ legnagyobb tömegmozgalmára, a szövetkezeti mozgalomra, mely azonos, vagy közel azonos célokért dolgozva leginkább érzi egy összekötő köss: a közös nyelv hiányát.

A bolgár, a magyar és az angol szövetkezeti eszperantisták ezért kezdeményezték néhány évvel ezelőtt a két mozgalom közötti szervezett kapcsolatot.

Ehez a szovjet, csehszlovák, lengyel, izlandi, francia, argentin és még sok más ország szövetkezeteiben dolgozó eszperantisták is csatlakoztak.

Unuigintaj Nacioj deklaris la jaron 1983 kiel jaron de internacia komunikado, ankaŭ per tio daŭrigante la praktikon de la pli antaŭaj jaroj, dediĉante po unu jaron al tiuj gravej sociaj temoj, kiuj okupiĝas pri la situaco, sorto kaj klopodoj de grandnombraj tavoloj de la homaro, kiuj el lastatempe estis jaroj de infanoj, maljunuloj aŭ de invaliduloj.

Eble la plej kerna demando de la Internacia Jaro de Komunikado estas la komuna lingvo, sen kiu la homaro eĉ en estonto ne komprenos unu la alian, kvankam ĉiu tereno de nia evoluanta vivo kiel eble la plej baldaŭ bezonas komunan lingvon.

La konstato precipe rilatas al la plej granda amasmovado, al la kooperativa, kiu laborante super sama, aŭ preskaŭ sama celo la plej grave sentas la mankon de kontaktilo: la komunan lingvon.

Tial iniciatis antaŭ kelkaj jaroj organizitan kontakton inter la du movadoj la bulgaraj, hungaraj kaj britaj kooperativaj esperantistoj.

Al la iniciato aliĝis esperantistaj kooperativanoj el Sovetio, Ĉeĥoslovakio, Pollando, Islando, Francio, Argentino, kaj ankaŭ el multaj aliaj landoj.

Igy került sor 1982. július 4-és 9 között Gyulán, s 20. Jubileumi SEU keretében az első Szövetkezeti Eszperantó Konferenciára. A Konferencián résztvett és felszólalt G. Maertens, az UEA elnöke is.

E fontos kezdeményezés elindítói és rendezői között voltak meggyenk szövetzeti eszperantistái is, akik évek óta sikerrel munkálkodnak a nyelv terjesztése érdekében. Például a Csehszlovák "DUKLA" és a Kardoskut-i "RÁKÓCZI" mg. Tsz-ek között tárgyasult eredménye is van már a közös nyelvnek.

Kivánatos lenne, hogy az eszperantó segítségével meggyenk minél több szövetzetében alakuljon ki ilyen kapcsolat más országok szövetzeteivel.

Sok sikert kívánunk az 1983. VII.30 és VIII.6-között Budapesten megrendezésre kerülő 68. Nemzetközi Eszperantó Kongresszus keretében megalkuló szövetzeti eszperantisták nemzetközi szövetségének. A Konferencián meggyenket 9 szöv. eszperantista képviseli a Koordinációs Bizottság 1983. március 18.-i határozatának megfelelően.

Békéscsaba, en monato marto, 1983.

Post tiuj antŝaĵoj okazis inter la 4-a kaj 9-a de julio la 1-a Kooperativa Konferenco enkadre de 20-a, Jubilea Somera E-Universitato en urbo Gyula. La Konferencon partoprenis kaj alparolis S-ro G. Maertens, prezidento de UEA.

Inter la iniciatintoj kaj aranĝantoj de tiu grava okazintaĵo ĉeestis la kooperativaj esperantistoj ankaŭ de nia departemento, kiuj jam de jaroj sukcese laboras pri disvastiĝo de la lingvo. Ekzemple inter la ĉeĥoslovaka "DUKLA" kaj hungara "RÁKÓCZI" de Kardoskut jam estas efektiviĝinta rezulto de la komuna lingvo.

Estus dezirinde, ke helpe de Esperanto elformiĝu similaj kontaktoj kiel eble en la plej multaj kooperativoj de nia departemento kun alilandanoj.

Ni deziras multe da sukceso al la internacia organizo de la kooperativaj esperantistoj, formiĝonta enkadre de 68-a UK, kiu okazos inter la 30-a de julio kaj 6-a de aŭgusto en Budapeŝt. Konvene al la decido de Kunordiga Komitato de Békés departementaj Kooperativaj, en la konferenco reprezentos nian departementon 9 kooperativaj esperantistoj.

KÁROLY GYÓRFI

prezidanto de Kunordiga Komitato de la Békés departementaj kooperativaj

NIA KOOPERATIVA STELO ĈIAM ATENDAS LA NOVAĴOJN ! POR ESTI KONVENA INTERLIGILO DE LA KOOPERATIVAJ ESPERANTISTOJ NI NE POVAS MALHAVI VIAN KUNLABORON ! ĈIUJ INFORMOJ PRI LA KOOP. ESPERANTO-MOVADO ĈIAM ESTAS BONVENIGATAJ !
PRENU SKRIBILON ANKAŬ VI !

NI FUNEBRAS.

En rapida sinsekvo da gravegaj perdoj trafis la kooperativan E-movadon de Békés-departemento, postlasante neniam replenigeblan lokon ne nur en la koro de la departementaj esperantistoj, sed ankaŭ en nia landa movado. Aparte grava perdo estas ilia forpaso por la kooperativa E-movado, ĉar ĝuste ilia agemo kaj helpemo malfermis "verdan vojon" al nia aktiveco.

La 20-an de januaro post longa kaj grava malsano forpasis en Orosháza k-do

MIHÁLY DUMITRÁS,

/ 1906 - 1983 /

prezidanto de la Departementa Komitato de HEA en dep. Békés, malnova batalanto de la laborista kaj Esperanto-movadoj.

Pri lia forpaso aperis pli detalaj nekrologoj kaj en la nacilingva, kaj en nia E-gazetaro, nun ni deziras primemori tiun lian gravegan rolon, kiun li plenumis en la koop.E-movado de nia departemento.

Tuj post la unuaj sciigoj, kiuj aperis en niaj revuoj pri la reviviganta koop.E-movado, li kiel prezidanto de DK tuj adaptis kooperativan respondeculon de DK, eĉ li mem entreprenis gvidi kooperativajn E-kursojn en Orosháza kaj Kardoskut, kvankam tiutempe li jam ne estis tute sana. Lia merito estas - inter aliaj - la naskiĝo de tiu kunlaboro-koncerto, kiu estigis inter la agrikulturaj kooperativoj de la ĉeĥoslovaka Vraccv kaj hungara Kardoskut. Lia persona kontakto malfermisoblecojn por ni, de tempo al tempo aperigi artikolojn pri la koop.E-movado sur la paĝoj de la departementa gazetaro.

Per la progreso de la koop.E-movado li neniam hezitis profiti siajn personejn kontaktojn. Ties rezulto estis ankaŭ la rajtigilo por du koop.esperantistoj, kiu ebligis viziti la kooperativojn de la departemento kaj persone renkontigi kun ties gvidantoj, klarigi la celojn kaj perspektivojn de Esperanto en la koop.movado. Ties rezulto estis pli ol dek E-kursoj per kiu fundamentigis kaj firmigis la koop.E-movado en nia departemento. La menciitan rajtigilon subskribis Lajos Flenter jr., -filo de nia alia forpasinto-, tiam prezidanto de Kunordiga Komitato de la Békés Dep-aj Kooperativoj.

Lia lasta plej granda laboro estis la uzo de sia tuta influo pro la sukceso de la 1-a Kooperativa Konferenco, kiu okazis pasintjare en Gyula, enkadre de 20-a Jubileo SEU. Tiun li jam ne povis partopreni ĉar tiam li estis grave malsana, sed ankaŭ en la hospitalo li akceptis nin kaj informigis pri la okazintaĵoj. Eĉ la plej malgranda sukceso ĝojigis lin.

Kvankam li plenumis altajn kaj gravajn postenojn en la publika vivo, li restis fidela filo de sia klaso, de la popolo. Ankaŭ ni kooperativaj esperantistoj pietate gardos lian memoron, la memoron de nia neforgesebla Ĉiĝo Miška, rememoran te pri lia luktoplana vivo, pri lia honoro per la poemo de nia poeto Gábor Csorai, laureato de premio Kossuth. La poemon tradukis Imre Szabo, sekretario de la Koop.E-Komisiano.

Gábor Garai :

MIHÁLY DUMITRÁS

Sepdek sep jarojn vivis li luktante;
meritus lia unusola paŝ'
honoran tombon, tamen urberande
volis ripozi Mihály Dumitrás.

Lin naskis suba rand' de Orosháza,
tien sepiris li post vivokraŝ',
post luktoj streĉaj, serto homfrakasa
perdinte fertojn Mihály Dumitrás.

La famili' ministron, estrojn denis;
enkaŭ li estris, kaj sen arbitraj'
fiere servis kaj obstine bonis,
urberande servis Mihály Dumitrás.

Ĉe l' urberande ŝtermoj ekfermentas
kaj ekripezas post puriga draŝ';
sub kalvaj arboj tie vin atendas
fina ripozo, Mihály Dumitrás.

Trad.: Imre Szabó

Eĉ tempon ni ne hevis rekonsciigi post la granda perdo
kiu trafis nin; jam alia deloriga sciigo ŝancelis la espe-
rantistojn de nia departemento. La 11-an de februaro pro
trafika akcidento sekvis sian amikon en la tombon

L A J O S P L E N T E R

/ 1 9 0 5 - 1 9 8 3 /

malnova batalanto de la laborista kaj Esperanto-movadoj, ano
de la Dep.Komitato de HEA en dep.Békés.

Li naskiĝis en la jaro 1905, kiel unu el la kvar gefiloj
de malriĉa kamperana familio. El la unua mond milito lia pat-
ro revenis malsana kaj baldaŭ mortis. La juna Lajos Plenter
iĝis metilernanto ĉe veturilfaristo. Peste kiel komizo li la-
boris en urbo Debrecen kune kun siaj amikoj, kun la Dumitrás
fratoj. Tie li aniĝis al la laborista movado kaj eklernis Es-
peranton, el kiujankeŭ li restis fidela ĝis sia forpaso.

Ĝuste dum la monda ekonomia krizo en la jaro 1930 li iĝis
memstera etindustriisto en Orosháza kaj en la sama jaro li
edziĝis; vivis la luktoplennan vivon de la tiama etindustri-

istoj.

De la jaro 1950 Lajos Plenter iĝis departementa sekretario de Landa Organizo de la Etindustriistoj / KIOSZ / kaj el tiu funkcio li emeritiĝis en la jaro 1967. Sed kiel pensiulo li daŭrigis sian aktivecon sur la tereno de la publika vivo kaj plenumis diverseajn gravajn funkciojn en la Partio, en la Patriota Popolfronto, en la gvidantaro de la departementa organizo de tiuj, kies ŝatokupo estas la ĝardenkulturo. Tiu laste estis unu el liaj plezuroj; la alia estis la vojaĝado. En ĉiu jaro li vojaĝis kun sia amiko Mihály Dumitrás por ekkoni la mondon, la homojn; sed la plej ofte ili vizitis siajn bulgarajn amikojn.

La forpaso de nia kara, ĉiam bonhumora kaj helpema Oĉjo Lajos estas duagrada perdo por la departementa kooperativa E-movado. Kiel pensiunista prezidento de departementaj etindustriistoj kaj ano de Dep. Komitato de NEA, eĉ kiel patro de direktita estro de la agraraj kooperativoj, jam de unua momento li aprobis kaj aktive helpis la antaŭeniron de la koop. E-movado.

Lian memoron ni gardos en niaj koroj.

Á. A-N.

GRAVA, ĜIS NUN NEKONATA INDIKO AL LA HISTORIO DE ESPERANTO EN LA KOOPERATIVA MOVADO.

LA ESPERANTISTA KOOPERATIVA MOVADO.

Kontribuaĵo al ties historio. --Indikoj pri la unua Esperanto-kooperativo en Slovakio, ĈSSR.

En la pasintjara Novembro numero de Esperantisto Slovaka ni legis artikolon pri la Internacia Kooperativa Konferenco en Hungario, kie estis mencio ankaŭ pri la Esperantista Kooperativa Movado. Certe post ioma tempo oni serĉos kaj kolektos indikojn pri tiu ĉi movado kadre en Esperanto. Jen, mi ankaŭ povas prezenti indikojn al tiuj, kiuj iam notas kaj skribos la historion de la Esperantista Kooperativa Movado:

En la jaro 1949, Ernesto Vaňa, la nuna prezidento de la Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio, iniciatis fondiĝon de Terkulturista Kooperativo Esperantista sur sia 50-hektara farmo en Hokevce, nur 2 km-ojn fore de la fama kuraĉleko Dudince. Sian planon li publike prezentis al la kongresanoj dum la unua postmilita E-Kongreso en Bretislava, kie oni entuziasme akceptis liajn decidajn vortojn. Envere li havis sur tiu farmo plurajn planojn ankaŭ kulturajn por la publiko, sed tamen la celo estis: per-kaj per-Esperanto agado kaj la farmo devis servi kiel bazo de la ekzistado por la kooperativo. Krom aliaj imagoj li planis en la etaĝa kastelo kun sufiĉe granda parke fondi konstantan Esperanto-Lernejon kun internulejo por tiuj, kiuj en mallonga tempo daŭre volas ellerni Esperanton. En planoj de E. Vaňa estis ankaŭ havi en la kastelo kulturen centron Esperantan kaj precipe granda lia deziro estis laŭ liaj altruisemaj ideoj fondi tie

humane-socialan hejmon per maljunaj esperantistoj kun ilia plena prizorgado, por ke tiuj povu tie vivi senzorge kaj krei laŭ siaj eblecoj ankaŭ fakojn literaturajn, poezion, tradukojn, ktp. laŭ siaj kapabloj kaj emoj.

Post kiam li komunikis sian planon al la kongresanoj en Bratislava, pluraj tuj entuziasme anancis sin al kunlaboro kaj kelkaj tuj elveturis al la farmo, per brigad-laboro helpi dum la green-rikolta sezono kaj restis tie dum kelkaj semajnoj. Tiel fakte la kooperativo ekkomencis sian ekzistadon laŭleĝe. Elektita estis komitato kaj la farmon de la kooperativo gvidis mem la iniciatinto. - Post nelonga tempo sekve de ŝanĝoj enlandaj, la ŝtato transprenis la bienon kaj la kooperativo ĉesis ekzisti.

Do jen, notu la menciitajn indikojn por la historio de la Esperantista Kooperativa Movado, pri la unua Esperantista Kooperativo en Ĉeĥoslovakio, por la venontaj generacioj, kiam la fondinto kaj la membroj de la kooperativa komitato jam ne ekzistos kaj ne povos doni informojn.

-erva-

I m r e J á k ó

ĈE NIAJ BULGARAJ AMIKOJ.

Jam naŭafoje aranĝis niaj bulgaraj amikoj de Kubrat la jam tradician VARE kun la tradicia sukceso. Ĉijare mi ricevis la honorigan taskon reprezenti la koop.E-movadon en tiu populara aranĝaĵo, kompreneble tiun de Békés-departemento.

Alveninte nekteze en la bulgaran limurbon Ruse, atendis la hungarajn kaj ĉeĥoslovakajn gastojn nia kara amiko Anton Antonov, kaj per aŭtomobiloj ni rapide alvenis al Kubrat, kie en la studenthejmo "Maxim Gorkij" jam atendis nin komforta loĝejo.

La festa programo komenciĝis la 29-an de januaro, post tagmeze je la 17-a. En la festa prezidantaro ĉeestis urbaj kaj distriktaĵgvidantoj reprezentante la Partion, la Sindikaton kaj la Konsilantaron.

En nomo de la loka esperantistaro k-de H.Dimitrov salutis la gastojn. K-de Anton Antonov parolis pri la kooperativa

E-movado, pri la sukcesa kunlaboro en ties kadro, kiu ĉiam pli vaste elformiĝas. Li parolis pri la bona kunlaboro inter Kubrat kaj Várpalota, poste substrekis la rolon de la 1-a Kooperativa Konferenco de Gyula, el vidpunkto de la plua evoluo. Alvokis la atenton al la 2-a Koop.Konferenco kiu okazos ĉijare en Budapeŝto dum la 68-a UK, Pietate li primemoris k-de Mihály Dumitrás, pri la granda perdo kiu trafis la hungaran kooperativan E-movadon per lia forpaso.

K-de Kočvara el Ĉeĥoslovakio parolis pri la meritoj de G.Dimitrov, pri la granda heroo de la bulgara popolo kaj tiu ankaŭ de la internacia laboristaro.

La programon plikolorigis kantprogramo de gelernantoj de la urbaj baz-kaj mezlernejoj.

La festa tago finiĝis ĉe la blanka tablo per bonega vespermanĝo, per multaj kantoj

kaj dancoj, en bonega humore
... ankaŭ tio laŭtradicie.

La 30-an de januaro antaŭ
tagmeze la partoprenantoj de
la 9-a VARE ekskursis al la
proksima arbardo, sed sur-
voje ili vizitis ankaŭ la
Klubon de la loka Esperanto-
Grupo.

La kunveno enkondukis An-
ton Antonov, poste la prezi-
danto de la loka Grupo H. Di-
mitrov transdonis diplomojn
al la eksterlandanoj.

Unu post la alia parolis
la enlandaj kaj eksterlandaj
gastoj kaj ankaŭ mi transdonis
la salutojn de la Békés dep-aj
kooperativaj esperantistoj.

Post la kunveno ni tagmanĝ-
is en la arbara gastejo de kie
pro mia laboro mi devis vojaĝi
hejmen.

Mi adiaŭis de niaj karaj bul-
garaĵ amikoj per la vortoj:

Ĝis revido dum la 10-a Jubilea
VARE, en 1984, lastsabate janu-
aro!

ŬLEZEZETT A SZÖVETKEZETI KONFERENCIA ELÖKÉSZITÖ BIZOTTSÁGA.

Február 12.-én dr. Pál József elnökletével ülésezett a buda-
pesti szövetségi konferencia 7 tagu előkészítő bizottsága.

A "Budapesti Informilo" áprilisi száma részletesen foglal-
kozott az előkészítő bizottság ülésével, melyet a szövetségi
esperantisták is bizonyára ismernek itthon és külföldön
egyaránt.

Az azóta eltelt időben a konferencia rendezői még két iz-
ben találkoztak, március és április hónapokban. Ezeken az ü-
léseken határozatokat hoztak az időközben felmerült kérdések
ben és folytatták a kapcsolatok szélesítését.

Folyik a konferencia elé terjesztendő határozati javaslat
egyeztetése a külföldi résztvevőkkel. Egyedül a bulgároktól
érkezett kiegészítés az eredeti határozattervezethez, mellyel
a május 13.-án megtartásra kerülő előkészítő bizottsági ülé-
s foglalkozik majd.

Ezen az ülésen kerül megtárgyalásra a végleges program,
a bel- és külföldi jelentkezők pontos számbavétele, majd a
bizottság szemlét tart a Konferencia tervezett színhelyén az
OKISZ Székházában.

Ismételten kérjük a szövetségi esperantistákat, hogy a
Konferenciával kapcsolatos javaslataikat küldjék el a Szövet-
kezeti Esperantó Bizottság címére, Szabó Imre titkárnak,
Budapest, VIII. Kenyérmező u 6, Pósfafiók 198, H - 1368.

KOOPERATIVA STELO SENPAGE PUBLIKAS LA ANONCOJN DE LA KOOPERA- TIVAJ ESPERANTISTOJ EN KIUJ ILI SERĈAS KONTAKTOJN KUN EN-KAJ ALILANDAJ KOOPERATIVAJ ESPERANTISTOJ.

PLANO DE LENIN PRI KOOPERIGO.

Antaŭ 60 jaroj - la 4-an de januaro 1923 - skribis V.I. Lenin la artikolon "Pri kooperado". Ĉi tiu mallonga verketo fariĝis gravega gvidilo por organizado de socialisma ekonomio ne nur en Sovet-Unio, sed ankaŭ en aliaj socialismaj landoj.

Post la Granda Socialisma Oktobra Revolucio pasintaj kvin jaroj, kiam la rusa proletaro man-en-man kun vastaj amasoj de kampularo sukcese batalis kontraŭ sia interna reakcio kaj diversaj intervenintoj, la soveta regpotenco estis firmiginta, sed la ekonomio laŭ sia karaktero ankoraŭ ne estis socialisma. La sistemo de t.n. "nova ekonomia politiko" / NEP / denis sufiĉe vastajn eblojn al privata entrepreno. Nun staris problemoj: kiel iri pluen? Kiel konduki la neorganizitan privatatan etproduktadon sur la relojn de socialisma grandmastro? Kiel indiki vojon el privata kapitalisma mastrumado al la socialisma?

"Kiam la ŝtata povo estas en la manoj de la laborista klaso, kiam al tiu ŝtata povo apartenas ĉiuj produktadrimedoj, nia tasko restis nur kooperigo de la popolo," skribis Lenin / V.I. Lenin. Verkoj, 33 v.p.427. Estonlingva eldono 1955 /. Li substrekis, ke kooperado en la kondiĉoj de la proleta diktaturo diferencas de la kooperado en kapitalisma socio. Leni konsideris kooperadon la plej konvena, komprenbla kaj akceptebla formo por unuigi la personajn interesojn de kampularo kun interesoj de la socio por transiri al socialisma mastrumado. Laŭ la plano de Lenin pri kooperigo bezonatis evoluigi ĉiujn formojn de kooperado kaj pere de elementaj formoj /konsum-, provinad- kaj vendadkooperativoj/ aliri al produktadkooperativoj. Unuigo de la kampularo en kooperativoj devis esti libervola, per konvinkigo pri promisoj de kooperativoj.

Lenin postulis helpon de laboristaro kaj konsideradon de lokaj cirkonstancoj, sed ankaŭ ĉiuf flankan ŝtatan subtenon al junaj komunaj mastrumoj. "Mi finas: vico de privilegioj, ekonomiaj, financaj kaj bankaj privilegioj al la kooperado; el tio devas konsisti la subteno de nia socialisma ŝtato al la nova organiza principo de organizado de la popolo." / Samloke, p.430 /.

Laŭ la plano de kooperigo de V.I. Lenin okazis kolektivigo de kampmastrumado kaj organizado de socialisma komerco en Sovet-Unio, laŭ la samaj principoj okazas transiro al socialisma mastrumado ankaŭ en aliaj socialismaj landoj.

Jaen. O j a l o
T a l l i n n
Sovet - Unio

ANKAŬ VIAJ ARTIKOLOJ ESTAS BONVENIGITAJ EN NIA KOOPERATIVA STELO ! NI ĈIAM ATENDAS ANKAŬ VIAN KONTRIBUON POR PLIALTIGI LA NIVELON DE NIA REVUETO; SKRIBU KIEL EBLE PLEJ BALDAŬ !

NEKROLOGO.

La 24-an de dec. 1982 en Britlando, en urbo Oldham forpasis CHARLES BARDSLEY / 1901-1982 / malnova esperantisto, ĉefa reprezentanto de la koop.E-movado en Britio dum la internaj periodoj. Dum kvindek jaroj li estis delegito kaj koop.fakdelegito de UEA. En 1934, baldaŭ post la iniciato de Jan Zawada en Pollando, Ch.Bardsley fendi en Britio Kooperativan E-Ligon kaj ankaŭ li komencis E-kurson en la gazeto de Brita Federacio de Kooperativa Junularo, en "Our Circle" / Nia Rondo /: krome sur la paĝoj de tiu junulara gazeto de tempo al tempo li verkis E-lingvajn artikolojn pri aktualoj de la kooperativa movado. Li estis kunlaboranto de nia unua E-lingva kooperativa revuo "Ĉielarka Standardo". Post la dua mondmilito, dum la 32-a UK en Bern, li denove kontaktigis kun la poloj kaj eldonis sian bultenon "Co-operatar Esperantist".

Kiam li informis pri la reviviĝo de la koop.E-movado, li rapidis progresigi la aferon transdoninte al ni multajn dokumentojn historie gravajn kaj siajn riĉajn spertojn, skizojn en la koop.E-movado dum duonjarcento.

La koop.E-movado gardos la memoron de sia pioniro.

NI GRATULAS !

PLI NOVAJ ĜOJIGAJ INFORMOJ PRI NIA PEEJ ANTIVA KOOP. GRUPO, PRI "VERDA STELO" DE SZOMBATHELY:

La 25-an de januaro kunvokis "VERDA STELO" kaj formis la unuan jaron - se sukcesan jaron - de sia laboro, ekzistante eĉ ankaŭ la taskojn de la dua; es probable eĉ pli sukcesan.

El inter la ekzistintoj de la pasinta jaro elstaras iliaj klubesperoj, kulturvospe-

roj, teatra prezentado, ekskurso al Ĉeĥoslovakio, ktp. En kadro de ilia E-kurso ili kooperativanoj preparigas al la "A" ekzameno. Ĝutere la anoj de la Grupo superas la nombron 50 !

Pri la kunsido de la "Verda Stelo" raportis ankaŭ la departementa tagjurnalo "Vas Népe" kun bildo pri la prezidantaro.

Post ion pli ol du semajnoj ni denove aŭdis pri la Grupo. Ĉifoje ili faris ion, kio estas tute nova en nia lando movado ! La esperantistoj de Elektra-kaj Ferindustria Kooperativo de Szombathely aranĝis "Komunistan Laborsekcion" per kies enspezo ili deziras apogi nian movadon.

Ni aparte gratulas la ideon, neune sekverdan ! Ankaŭ pri tiu okazintaĵo raportis "Vas Népe".

La ĝistiaman bonan laboron kvazaŭ kronis tiu "Esperanto-Tago", kiam "Verda Stelo" aranĝis la 30-an de aprilo en la Junulara Klubo de HTSZÖV.

Pri la aranĝaĵo ni certe ricevos pli detalan informon.

KOOPERATIVANO IĜIS LA NOVA
PREZIDANTO DE LA BEKÉS DEP-A
KOMITATO DE HBA.

La Bekés Dep-a Komitato de HBA kunsidis la 26-an de februaro en urbo Békéscsaba, por taksu la laboron de la pasinta-kaj prepari la laborplanon de la kurenta jaroj. Post profunda analizado de la pasinta ili sintezis la planon al la jaro 1983. Fine venis la vico elektu novan prezidenton, kiu posteno vakantigis pro forpaso de k-ĉo Mihály Dunatros. La komitato unuanime elektis kiel prezidenton k-ĉon József Wagner, kiu el la gvidintoj de la departementa koop.E-movado.

NOVAĴOJ PRI LA PREPARA LABORO DE LA BUDAPEŝTA KOOPERATIVA KONFERENCO.

BRITLANDO: Nia kara amiko John Harrison informis la preparan komitaton, ke li partoprenos la Konferencon kun 10 britaj kooperativaj esperantistoj.

Krome li faris interesan intervjuon kun k-do Jack Jones pri E en la kooperativa kaj sin dikata movadoj interlige de nia ĉijara Koop.Konferenco.

BULGARIO: La Koop.Sekcio de BEA informis nin, ke la bulgaran kooperativan E-movadon tri personoj reprezentos en la Konferenco:

Prof. Raĭĉev, honora prezidanto de KES;

K-do Dimitar Mutuŝev, ĝen. sekretario de KES, kaj

K-ino Maria Paskeva, prezidanto de Bulgara E-Kooperativo, ano de KES.

ESTONA S.S.R.: Ĝuste nun alvenis la gojiga sciigo, ke k-do Jean Ojalo partoprenos la Konferencon. Ni ĝoje atendas lin!

POLLANDO: S-ino Maria Zawada sciigis nin pri partopreno en la Konferenco kaj ŝi prelegos pri la lernejaj kooperativoj en Pollando.

La Prezidentaro de PEA kaj enties nomo k-do Jerzy Leyk prezidante komisiis k-don Tadeusz Eysmont pri la kooperativaj aferoj de PEA.

Grava novaĵo kaj ni esperas ke la poloj baldaŭ okupos la iaman gravan rolon en la koop.E-movado.

K-do Imre Szabó, kiu oficiale vizitis Pollandon fine de aprilo denis intervjuon al Esperanto Dissendo de la Pola Radio pri la preparlaboroj de la Koop.Konferenco.

ALIAJ INFORMOJ PRI LA KONFERENCO.

La prepara komitato prenis kontakton

kun la prezidanto de Kanada E-Asocio. Estas ĝenerale konata, ke la venontjara UK okazos en Kanado, en urbo Vancouver, kiun certe malmultoj partoprenos el Eŭropo. Ni petis E-Asocieton de Kanada komisiu esperantiston pri kooperativaj aferoj. Kun s-ro Sigurdsson ni havas konstantan kontakton.

Sukcese ni prenis kontakton kun Japanio, Argentino, kun la koop.Sekcio de Eŭropa Komunumo kaj kun la Kooperativa Asocio de Svedio

VEGETARANOJ ATENTU!

Karan leteron ni ricevis el Ĉeĥoslovakio, el Dudince, de nia kara samideano Ernesto Vaňa. Li estas la prezidanto de Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio - cetere pioniro de la koop.E-movado, fondinto de tiu Esperantista Kooperativo pri kiu vi trovis interesan artikolon sur la 5-a paĝo de ĉi tiu numero.

Li sendis al ni numeron de buletino de TEVA, kiun ni volonte sendos al interesiĝanto. Por preni rektan kontakton kun li, jen la adreso:

Ernesto Vaňa
ĈS-962 71 Dudince,
Ĉeĥoslovakio.

UTILIGO DE LA FRATURBAJ KAJ DEPARTEMENTAJ INTERRILATOJ POR DISVASTIGI LA KONTAKTOJN DE LA KOOP.E - MOVALO.

En nia 11-12-a nroj de 1982, en ĉefartikolo ni jam okupigis pri ĉi tiu temo. Ĉar ni ricevis tiurilate multde demandoj, ni publikigas nia maniere solvis la menciitan problemon en kelkaj urboj kaj departementoj. Kie la loka kaj dep-a E-movado havas bonajn rilatojn kun la instancoj, ni devas labori tiucele, ke en la delegito

re kiu vizitas la eksterlandan fraturban kaj departementon, ĥa vu lokon unu - la lingvon bone parolanta - esperantisto.

Pro manko de loko ni ne povas publikigi la liston pri tiuj kontaktoj de urboj kaj departementoj, sed ni opinias, ke la tiurilateajn informojn ĉiu povas facile akiri surloke.

ĈU VI SCIAS, KE NIA HEA HAVAS KUNLABORO-KONTRAKTON KUN NIA JUNULARA ORGANIZO KISZ ?
SERĈU LA KONTRAKTON KUN LA LOKA KISZ-ORGANIZO, ĈAR ILI MULTATE POVOS HELPI ANKAŬ VIAN LABORON !

- K I O N O N I S K R I B A S P R I N I ? -

Yesi Szövetkezeti Élet / 1982.dec. /

Szinházi előadás az eszperantó klubban.
/ Az előadás egyik jelenetének képével./

/ Földes László /

Vas Népe / 1983.febr. 8. /

Eszperantisták közgyűlése.

/ Név nélkül /

Vas Népe / 1983.febr. 15. /

Eszperantisták kommunista műszakja.

/ Népíhír, név nélkül /

Budapesta Informilo / 1983. marto /

Esperanto-movado en Békéscsaba festis 75-jaran datrevenon.

/ Á.Abonyi-Nagy /

Ŝia neforgesebla travivaĵo.

/ Á.Abonyi-Nagy /

Budapesta Informilo / 1983. aprilo /

Nekrologo de Mihály Dumitrás.

/ Á.Abonyi-Nagy /

Kunsidis la prepara komisiono de la kooperativa konferenco.

/ Á.Abonyi-Nagy /

Informa kaj varba agado en Bulgario.

/ D.Mutušev /

Savaria Esperanto-Revuo / 1983. marto /

Tri sciigoj pri la laboro de la koop.E-Grupo "Verda Stelo".

/ László Földes /

Békés megyei Szövetkezeti Élet / 1983.február /

A gyulai konferencia hatására.

/ Abonyi-N. Á./

Gyórfi Károly a soros elnök.

/ Név nélkül, 1983.márc./

Békés megyei Népujság / 1983. febr.27 /

Eszperantisták tanácskozása. Nyelvoktatás
kulturális tevékenység, tisztujítás.

/ Vas Márta /

Békés megyei Népujság / 1983. márc.19 /

Világtalálkozó Budapesten - tolmács nélkül.

/ Dr.Barát Endre

LA PLEJ EFIKA INSTRUO ESTAS LA PRAKTIKO !

Niaj popularaj gejunuloj Maria kaj Andreo nun denove ren-
kontigis kaj kune vizitis la Sparkesan Kooperativon por fun-
damenti ankaŭ finance la partoprenon en la 68-a UK.

Andreo: Saluton kara Maria ! Mi vidis vin antaŭlonge-trelonge!
Certe pro via trea okupiteco, ĉu ne ? Ĉu vi fartas
bone ?

Maria : Saluton Andreo ! Dankon mi jam fartas iom pli bone.

Andreo: Iom pli bone ?! Ĉu vi estis malsana ?

Maria : Ĉu vi pensas, ke ĝuste min estus evitinta la vintro-
fina gripo ?

Andreo: Ankaŭ min apenaŭ ĝi evitis.

Maria : Krom la jarfinaj laboroj en la kooperativo kaj ankaŭ
miaj privataj laboroj absorbis preskaŭ ĉiujn miajn
liberejn horojn.

Andreo: La jarfinajn laborojn mi bone komprenas, ja tiuj ri-
petigas ankaŭ en nia kooperativo de jaro al jaro; sed
tiom multe da privataj laboroj ?!

Maria : Ĉu vi havas tempon ?

Andreo: Por vi ?! Eĉ se hajlos ĥakiloj !

Maria : Espereble tio tamen ne okazos. Do, se vi havas tem-
pon bonvolu akompani min kaj mi rakontos la plej gra-
vajn el tiuj.

Andreo: Ĝoje mi akompanas vin kaj mi estas ununura, giganta
orelo.

Maria : La plej grava el miaj privataj laboroj: prepari mi-
an ĉijaran someran programon.

Andreo: Eĉ la printempo ankoraŭ ne elvenis kaj vi jam prepara-
ras someran programon ?

Maria : Ĉu vi scias kiel rapide forflugas la monatoj ? Bal-
daŭ alvenos la 68-a UK, kiun mi nepre volas partopre-
ni eĉ pro du kaŭzoj. Unuflanke pro ebleco partopreni
la unuan E-Kongrescon de mia vivo; aliflanke kiel ko-
operativano mi volas ĉeesti la kooperativan konferen-
con kiel reprezentanto de nia departementa kooperati-
va movado.

Andreo: Mi jam komprenas. Ankaŭ nia kursgvidanto perolis al
ni pri la UK, sed ĝis nun mi ne povis kolekti tiom da
kurso, ke mi anoncigu. Ja mi estas nur komencanto...

sed nukso en dura ŝelo ankaŭ la necese mono ...

Maris : Ĉuste nun mi volas solvi ĉi dura ŝelan nukson. Jen nia Ŝparkasa Kooperativo. Tien ni eniros.

Andreo : Ankaŭ mi ?!

Maris : Ja vi promesis akompani min !

Andreo : Fakte.

Gvidanto de la Ŝparkasa Kooperativo : Bonan tagon Maris kaj Andreo. Bonvolu sidigi. Per kio mi povas esti je via dispono ?

Maris : Mi deziras deponi mian ŝparitan sumeton, ĉar mia somera programo konsumos belan rondan sumon. Jen mia ŝparlibro. Nun mi deponas du mil forintojn.

Gvid.de la Ŝpark. Koop. : Dankas vian fidon metitan sur nin kara Maris. Mi tuj aranĝos vian ŝparlibron.
- Jen, la afero estas en ordo. Jen via ŝparlibro.

Maris : Dankon.

Gvid.de la Ŝpark. Koop. : / al Andreo / Kara Andreo per kio mi povas servi al vi ?

Andreo : Mi petas 10 loterio-kaj 15 sportveto-kuponojn, ĉar mi nepre volas gajni multe da mono.

Gvid.de la Ŝpark. Koop. : Kara Andreo, ĝis nun mi ne povis vin saluti inter niaj klientoj. Kun via afabla permeso mi faros al vi kelkajn utilajn proponojn al la realigo de viaj planoj.

Andreo : Mi tre ĝojus aŭdi viajn proponojn, ĉar ĝis nun mi neniam pensis pri utiligo de la servo de nia Ŝparkasa Kooperativo. Nun aŭdante la someran planon de Maris, ankaŭ mi volas fari planon someran.

Gvid.de la Ŝpark. Koop. : Tere de lotumado kaj sportveto sendube eblas gajni monon, se Fortuno vin favoras. Mi tamen proponas al vi pli certan metodon, eĉ metodojn. La unua el ili, deponi vian ŝparitan monon kiel rentumantan enmetaĵon. Se la deponaĵon vi lasas ĉe ni dum unu jaro, vi ricevos pli altan rentumon, ol se ĝin vi deponas je malcerta tempodaŭro. Plie mi povas rekomendi al vi nian alian servon, la tn. asignan deponon, kiu alportas interezon simile al la jam menciita, sed laŭ via dispono vi povas asigni el ĝi al kiu ajn. Tion oni nomas metodo por damaĝi la monbileton. Sed eĉ per tio ne elcerpigis la sortimento de nia servo ! Ekzemple post la efektivigo de via somera plano, vian ŝparitan monon vi povas deponi en speciala ŝparlibro per kiu vi povas gajni aŭtomobilon plurfoje dum unu jaro.

Andreo : Mi tre dankas viajn valoregajn informojn. Jam ankaŭ mi aniĝos al la ŝparemaj homoj. Mi tamen devas konsideri, kiu el la menciitaj formoj estos la plej oportuna al mi. Ĝis revido !

Gvid.de la Ŝpark. Koop. : Mi havu la honoron vidi vin ankaŭ aliffoje. Ĝis revido !

Andreo: Nu kara Maria, ankaŭ mi decidis ! Ankaŭ mi ŝparos ! Sed mi havas ankoraŭ problemon: ĉu mi, absoluta komencanto sukcese povos partopreni la Kongreson ? Ja vi bone scias, ke mi komencis lerni la lingvon nur pasintaŭtune.

Maria : Se vi pensas pri ebleco, mi povas trankviligi vin, ĝi ne ligiĝas nur al unu kondiĉo: Vi devas esti ano de HEA. Mi dencs al vi aligilon, plenigu ĝin zorge, poste sendu ĝin al la adreso de HEA, Budapest 5, Poŝtkesto 193. La poŝtkodo estas 1368. Se vi anoncigos, vi povos partopreni kun mi. KREDU MIN vi multe lernos, neparclante pri tio, ke vi konatiĝos kun multaj esperantistoj kaj certe akiros multe da amikoj.

Andreo: Mi tre dankas ĉion, ĉefe tion, ke mi povos partopreni la Kongreson kun vi

Maria : Andreo !

Andreo: Bone, bone ! Mi ne daŭras, tamen permesu al mi akompani vin al via laborloko.

Maria : Jes, venu.

Andreo: Morgaŭ ankaŭ mi portos mian modestan ŝparitan monon al nia Ŝparkasa Kooperativo, kaj se vi forte volas, mi certe gajnos ankaŭ en la lotumado; kaj se mi gajnos, ankaŭ tiun monon mi depencs en mian ŝparlibron.

Maria : Se nur tio necesas al vi gajno, mi promesas, ke ankaŭ mi forte volas. Nu, ni jam elvenis. Ĝis revido Andreo.

Andreo: Sed mi havas tion multe da demando de vi, kiam ni renkontiĝos ?

Maria : Se la vetero restos tiel bona ankaŭ vespere, ni renkontiĝu en nia esprezo. Ĉu bone ?

Andreo: Eĉ bonege ! Mi estos tie. Ĝis revido Maria.

J.W.

NI KORE GRATULAS NIAN PLEJ NOVAN KOOPERATIVAN GRUPON EN URBO KISKÖRÖS. NI DEZIRAS AL LA GVIDANTO, AL S-ANO STEFANO PŬZESI MULTE DA SUKCESO.

Pro manko de loko nur unu anekdoto

LA POTENCO DE LA SCIO...

En Prusio jam en la pasinta jarcento estis tre populara la ŝtata loterickies kuponj estis aĉeteblaj en ĉiu urbo ka vilaĝo.

Servistineto en urbeto Hagen venis al la vendisto kaj petis la kuponon kies numero estas dudektri.

Post kelkaj semajnoj la eta servistino gajnis grandan sumon. La homoj venis gratuli sin kaj ĉiu intensigis, kiel sukcesis diveni ĝuste ĉi tiun numeron.

-Ho ĝi estis tre facile - ŝi respondis. Unue mi songis pri sep, dum sekventa nokto denove pri sep; eĉ la trian nokton sep. Ĉar trifeje sep faras dudektri, tial mi petis ĉi tiun numeron !